

TASKO POR NIAJ LEGANTOJ:

Kiu kuraĝos traduki ĉi poemon  
(eĉ fragmente) en Esperanton?  
Pri la rezulto venontnumere.

LA PIPO DE STALIN

Foje Stalin perdis sian pipon. Li tuj telefonis al Berija:  
"Berija, mia pipo perdiĝis."  
Post iom da tempo li trovis la pipon kaj denove telefonis al Berija:  
"Berija, la pipo estas trovita."  
Sed Berija respondis:  
"Tro malfrue! Ses teroristoj jam konfesis kaj estis pafmortigitaj!"

"Proboha, pane doktore, aspoň něco mi zakažte. Na tolik demokracie nejsem plipravenej!"  
"Pro Dio, sinjoro doktoro, almenaŭ ion malpermesu al mi. Por tiom da demokratio mi tute ne estas preta!"

(Ambaŭ el Sennaciulo 1990/6)

RUMUNSKO. Rumunský lid zaplatil za své vítězství nad tyranskou vládnoucí rodinou krvavou daní. Zvláště kruté boje byly v Timisoaře. Nová doba v historii Rumunska znamená nové nadějně vyhlídky také pro esperanto. Byl založen Rumunský esperantský svaz a Jeho předsedou byl zvolen univerzitní profesor dr. Ignat Florian Bociort. Jsou předpoklady pro brzké zřízení 40 klubů. Esperantistů je zatím v Rumunsku jen několik tisíc. Ponejvíce se učilo esperantu v univerzitních kursech, které byly v zemi početné. Znovuobnovení esperantského hnutí v Rumunsku se uskutečnilo výlučně v akademických kruzích a s pomocí univerzitních a akademických hodnostářů.

PRVNÍ ZPRÁVA Z KUBY. Ve dnech 14.-21.7.1990 se uskutečnil v Havaně 75. světový esperantský kongres za přítomnosti více než 1600 osob ze 54 zemí. Zúčastnil se ho i prezident republiky Fidel Castro. Další zprávy za sjezdu přineseme v příštím čísle.

69. SJEZD NĚMECKÝCH ESPERANTISTŮ bude v Mnichově 17.-20.5.1991. Přihlášky: Germana Esperanto-Kongreso, München, SRN.

POLSKÝ ROZHLAS vysílá v esperantu každý den v 5.00, 11.00, 13.00, 17.30, 20.30 a 21.30 západoevropského času. Informace: Rádio Polonia, Esperanto-Redakcio, skrytka pocztowa 46, 00-950 Warszawa, Polsko.

POZVÁNÍ NA MEZINÁRODNÍ SETKÁNÍ V NĚMECKU. Již v loňském roce byla mezi ČES a esperantským svazem SRN podepsána dohoda o vzájemné spolupráci. Západní Německo přišlo s iniciativou uspořádat setkání esperantistů tří zemí - SRN, NDR a Československa. Aby náklady pro nás byly co nejnižší, bude se toto "Trilanda Renkontiĝo" konat v městě Hof (60.000 obyvatel), blízko našich hranic. Pro Čechoslováky byly zajištěny velmi výhodné podmínky: účastnický poplatek 35 DM se nemusí platit a ubytování je v domově mládeže (nocleh se snídaní 13 DM, oběd a večeře po 10 DM). Setkání se uskuteční letos ve dnech 19. až 21.10. Přihlášky, program a informace o SPOLEČNÉM zájezdu podá sekretariát Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 Praha, tel. 220262.

PRVNÍ KONGRES ESPERANTISTŮ V TOGU se konal 27.-30.3.1990 v městě Aného za přítomnosti asi 130 osob z 9 klubů. Jednalo se o šíření esperanta v zemi.

ŠVÝCARSKÝ ROZHLAS vysílá zajímavé pořady také v esperantu. Velký ohlas z celého světa dokazuje úspěch těchto vysílání. Pondělí, čtvrtek a sobota, 6,165 a 9,535 MHz. Adresa: Svisa Radio Internacia, Esperanto-Servo, CH-3000 Bern, Švýcarsko.

MEZINÁRODNÍ SVAZ PRO NÁBOŽENSKOU SVOBODU (IARF) měl v Hamburku letos svůj 27. kongres ve dnech 27.7. až 2.8. Zúčastnilo se ho více než 600 delegátů z 23 zemí. Kongres pozdravili zástupci Světové rady církví, Vatikánu, Světové humanistické společnosti a jiných organizací. Také esperantisté z Československa poslali pozdrav, který tam přetlumočil pan Miloš Mikota z Brna. V něm se zdůrazňuje, že jak IARF, tak i esperantisté mají shodný cíl: přátelství a porozumění mezi národy.

SEKCE KŘESŤANSKÝCH ESPERANTISTŮ (KELI) OPĚT USTAVENA! Po násilné likvidaci sekce KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia) předchozím politickým režimem, byla letos 3. června obnovena její činnost. Jejím předsedou byl opět zvolen br. prof. dr. Rudolf Horský. Pracovní náplň sekce zůstává nadále myšlenka soužití a bratrství mezi národy v duchu křesťanské lásky, podpora tvůrčí činnosti členů sekce, používání esperanta při šíření evangelia Ježíše Krista a rovněž sociální křesťanská činnost, zvláště pomoc zrakově chorým ve třetím světě. - Ke spolupráci zveme všechny křesťanské esperantisty nekatolické konfese (ač i katolíky mezi sebou rádi uvítáme). Můžete se přihlásit u jednatele sekce br. Jaroslava Sperlinga, Heydukova 11, 130 00 Praha, který Vám ochotně zašle přihlášku (členský příspěvek je dobrovolný) a současně nabídne i odběr časopisu DIA REGNO, vydávaného v Belgii.

ŠESTÝ SJEZD ČESKÉHO ESPERANTSKÉHO SVAZU se bude konat 23.-26.11.90 v Třebíči.

Mírová sekce ČES spolu s Kroužkem esperantistů v Kladně uspořádají MÍROVOU KONFERENCI v rámci oslav 80 let vzniku kroužku Esperanto v Kladně ve dnech 22. a 23. září 1990. Adresa pro přihlášky: Městské kulturní středisko. Kroužek esperantistů, 272 01 Kladno.

Na příští rok se chystají VZPOMÍNKOVÉ OSLAVY na počest známého esperantisty, kněze JANA FILIPA, který zemřel 21.11.1971 a pochován je v Příbyslavi u Havlíčkova Brodu. Další zprávy v příštích číslech.

MAĎARSKÉ MINISTERSTVO POŠT vydalo korespondenční lístek s esperantskou známkou a kresbou na paměť 29. maďarského esperantského sjezdu v Budapešti 18.-20.5.1990.

43. SJEZD MEZINÁRODNÍ ŽELEZNIČÁŘSKÉ ESPERANTSKÉ FEDERACE se bude konat v příštím roce ve dnech 11.-17. května v Brně. Během letošního srpna bude stanovena výše sjezdových a ostatních příspěvků. Zájemci z Československa budou mít slevu na kongresovém příspěvku, pokud jsou členy ČES nebo SEZ. Nyní si již můžete psát o přihlášky na adresu: Pavel Polnický, Příčná 150, 290 01 Poděbrady.

LANČOVSKÝ LETNÍ ESPERANTSKÝ TÁBOR byl plně obsazen ve všech turnusech, kterých se zúčastnilo přes 500 osob, z toho 99 zahraničních hostů z Jugoslávie, Bulharska, NDR, Maďarska a Francie.

Z HISTORIE POMNÍKU ESPERANTA VE FRANTIŠKOVÝCH LÁZNÍCH. Na valné schůzi Klubu esperantistů, konané koncem roku 1913 ve Františkových Lázních, bylo za účasti starosty města a zástupců městské rady definitivně rozhodnuto postavit pomník esperantu, což se setkalo s plným pochopením esperantských klubů v celém bývalém Rakousko-Uhersku. Starosta města slíbil

darovat pozemek a poskytnout finanční podporu až do výše poloviny nákladů. A pak začaly chodit příspěvky větší, i korunové dary od chudších nadšenců. Větší dar byl od kněžny Heleny Kopassisové, vdovy po knížeti ostrova Samos (také esperantisty), z carského Ruska i odjinud. Tak byl postaven PRVNÍ POMNÍK ESPERANTU NA SVĚTĚ. Avšak tento pomník zničili nacisté. Nyní si Český esperantský svaz uložil postavit na tom místě nový pomník, který má být odhalen v roce 1992 při příležitosti světového sjezdu esperanta v Praze. Dary možno zasílat poukázkou na: ČES, Jilská 10, 110 01 Praha.

NOVÉ KURSY ESPERANTA pro začátečníky a pokročilé budou zahájeny počátkem října. Místo a datum bude ještě oznámeno.

POZOR, ZMĚNA! První dvě klubovní schůzky po prázdninách budou tentokrát ve ČTVRTEK 6. a 13.9. v 19.30 na Radnické. Místo a datum dalších pak sdělíme.

#### VI POVAS EKABONI JENAJN GAZETOJN ĉe Poŝta Gazetara Servo (PNS)

(laŭ Verda Familio 1990/3):

16151 El Popola Ĉinio	12x	348,—	
20228 Bulgara Esperantisto	12x	78,—	
25159 Budapeŝta Informilo	24x	66,—	(oni atendas plialtigon)
25377 Hungara Vivo	12x	105,—	
25423 Juna Amiko	4x	39,—	
31635 Der Esperantist	12x	33,—	(sorto necerta post unuiĝo)

NIA JUBILEULINO. Gravan vivjubileon atingis la 8-an de julio nia longjara anino s-rino ALENA RŮZIČKOVÁ-PAVLÍNOVÁ, eminentega aktorino en la Teatro de Fratoj Mrštík en Brno kaj profesorino de JAMU. Dum la omaĝo en nia klubo la sinjorino rikoltis ovaciojn kaj prezentis al la ĉeestantoj recitaĵojn kaj ampleksan teatran fragraenton. - La plej korajn gratulojn kaj dezirojn de ankoraŭ multegaj jaroj en plena sano kaj konstanta korpa kaj spirita freŝeco transdonas EK en Brno.

FORLASIS NIN du longjaraj, fidelaj membroj de nia klubo. Estis la 17-an de junio s-ano OTAKAR SVOBODA el Brno kaj la 12-an de Julio s-anino BOŽENA CHALUPOVÁ el Jihlava. Ni nemoru ilin kun honoro!

Náš klub vydal v červnu 1990 pěknou obrázkovou povídku "ZAMENHOF". Z francouzského originálu Ghislaine Tilleuxové s obrázky Bruno Disana přeložil a upravil Miroslav Malovec. Texty v češtině a esperantu vepsala Eva Hliněnská. Brožurka má 36 stran formátu A 5 a její cena je 12 Kčs. Zde na ukázkou jedna strana ve skutečné velikosti:

#### PRI LA 63-a KONGRESO de SAT en LINZ

Adolf Veselý

Sub la kapo da SAT ni ĉi-jare renkontiĝis por la unua fojo entute en orientaŭropaj landoj kaj el aliaj por diskuti pri nia estanteco. Atmosfero estis iom peza, ĉar la komunistoj esperis, ke al KEK (Kolektivo Esperantista Komunista) kaj SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) kreiĝos unu sola komuna organizo. Tamen, post longa diskutado, ĉiuj, eĉ la komunistoj, kun tiu propono fine malkonsentis.

Ni loĝis pro financaj kaŭzoj en junular-gastejo tre avantaĝpreze. Oni imagu, ke ĉiu pagis por la tuta restado nur 1300 a.ŝ. Enkalkulita estis la kongreskotizo (200 a.ŝ.), ĉambro, matenmanĝo, tagmanĝo, vespermanĝo kaj tutsemajna vojaĝbileto. La manĝo kaj trinko sin montris variaj kaj abundaj. Krom tio ni povis ankaŭ partopreni en tri diversaj ekskursoj, interalia al Mauthausen.

La kongresa programo estis interesa kaj ĉie regis vera amikeca etoso. Ĉie ni aŭdis nur ci-diradon kaj ĉiu vokis la alian laŭ lia aŭ ŝia antaŭnomo. Ekzemple: Petro, Remo, Kreŝo, Sofia, Fredo,

Miro ktp. Multaj rekonis min, kvankam mi ne vidis ilin ekde la jaro 1967. La plimulto parolis nialingve tiel perfekta, ke tio ŝajnis kvazaŭ ilia gepatra lingvo. Kun krokodilado ni preskaŭ ne renkontiĝis. Sed iuj orienteŭropaj aŭ aŭstrodevenaj amikoj iom devus atenti pli klaran prononcon.

Kiu ŝatus scii iom pli pri ĉi tiu neordinara altira kongreso, povas pri ĝi legi en la venonta Sennaciuiso, kiun ricevas nia klubo. Ĉi-sube mi ankoraŭ aldonas nian kongresan deklaron, kiun verkis komune ĉiuj partoprenantoj:

### **DEKLARACIO de la 63-a Kongreso da SAT en Linz en 1990**

La 63-a Kongreso de SAT, okazinta de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto 1990 en Linz (Aŭstrio) kun 292 partoprenantoj el 21 landoj, aprobis la jenan deklaron:

La kongreso

konstatas, ke ĉiuj ekstremaj, perfortaj kaj diktatorecaj (dekstraj, maldekstraj, religiaj aŭ aliaj) ideologioj kaŭzas la plej gravegajn turmentojn kaj mizerojn al la laborista klaso kaj ke ili, per siaj totalismaj agadoj, plej forte subpremas la popolojn kaj malebligas sukcesan socian evoluadon;

observas, ke la disfalo de tiuj diktaturoj kontribuas al pli rapida socievoluo kaj plibonigo de la sorto de ĉiu homo;

salutas la emancipiĝon de la respublikoj en Sovetio kaj de aliaj orienteŭropaj landoj kaj esperas, ke ankaŭ ceteraj landoj sub diktatoraj reĝimoj liberiĝos;

bedaŭras la ekaperon de novaj religi-fanatikaj diktaturoj en aliaj mondpartoj;

proponas daŭran subtenon al la tutmonda laboristaro por komuniki la bezonatajn informojn cele al progreso de la laboristaj movadoj per siaj disponeblaj rimedoj (amaskomunikiloj kaj internacia lingvo Esperanto);

atentigas pri ĉiuj poluadoj, kiuj grave endanĝerigas la vivon sur nia tuta planedo, kaj apogas la ekologiajn agadojn.

### **Henriko Seppik forpasis**

La 4-an de februaro 1990, kvin tagojn antaŭ sia 85-a naskiĝtago, mortis Henriko Seppik. Li naskiĝis la 9.2.1909 en Pärnu (Estonio). En la jaroj 1918-24 li studis en Tallinn humanisman gimnazion, kie elkreskis lia intereso por Esperanto, kaj en 1925-29 en Tartu-Universitato la estonan kaj latinidan filologiojn. Jam dum la studoj li eklaboria kiel instruisto de Esperanto unue en Estonio kaj poste (1929-39) an Svedio, Norvegio, Danio kaj Ĉeĥoslovakio. Li ankaŭ aktivis kiel tradukisto. Dum 1947-56 li suferis stalinisman teroron en Komi. Post reveno hejmlanden li dediĉis sin al tradukado de nordlandaj verkistoj. En la estonan li tralukis pli ol 40 librojn, ekz. de Strindberg, Hamsun, Nexö, Laxness. Li estis honora membro de norvega PEN-klubo. Entombigita li estis en Tallinn la 10.2.1990.

(Laŭ Esperantisto Slovaka 1990/3)

### **El la antaŭparolo al la libro "La Tuta Esperanto" de Henriko Seppik:**

Kiam antaŭ 17 jaroj kiel juna gimnaziano mi lernis Esperanton, antaŭ mi stariĝis diversaj lingvaj problemoj, al kiuj mi ne trovis respondon en miaj elementaj lernolibroj. Tial mia perfektigado estis tre pena kaj malrapida, ĉar klaran koncepton pri la plana strukturo kaj spirito kaj diversaj intimaj detaloj de la lingvo mi devis iom post iom ĉerpi per zorga legado de la literaturo kaj gazetaro, plejparte mem eltirante la regulojn.

Poste, precipe dum mia multjara agado an Svedio, Norvegio kaj Ĉeĥoslovakio kiel profesia Esperanto-instruisto, mi konstatis, ke la samajn malfacilaĵojn havas ĉiuj, kiuj volas fundamente ellerni nian lingvon, kaj ke la kaŭzo, ke ekzistas tiom da "eternaj komencantoj", ke ofte eĉ malnovaj kaj laŭdire perfektaj esperantistoj faras erarojn, kuŝas simple en tio, ke mankas lernolibro, kiu sisteme kaj en populara maniero klarigus al ili la tutan delikatan konstruon kaj mekanismon de la lingvo.

La celo de tiu ĉi libro, kiu antaŭ du jaroj aperis en Stokholmo en sveda prilaboro kaj nun prezentiĝas reverkite kaj kompletigite en internacia vesto, estas forigi tiun mankon. Ĝi estas destinita por tiuj, kiuj jam tralernis iun elamentan lernolibron aŭ vizitis kurson por komencantoj kaj nun deziras perfektigi sin kaj penetri profunden en la organismon da la lingvo, samtempe havante ankaŭ bonan ripetadon kaj ekzercadon. La libro volas esti ankaŭ speco de utila gramatika manlibro por pli-malpli perfektaj esperantistoj, kiuj bezonas klarigojn kaj konsilojn pri iu lingva demando. Per la helpo de la alfabeto registro en la fino de la libro oni povas facile trovi ĉiun necesan lingvaĵon.

Tiu ĉi libro ne volas esti teoria studo, sed praktika helpilo kaj konsilanto por tiuj, kiuj volas serioze ellerni kaj uzadi la Internacian Lingvon en la diversaj fakoj de la internacia vivo. Tial ĝi ne sekvas sekajn dogmojn kaj regulojn, sed klopodas priskribi la vivantan Esperanton, kiu estas uzata en la praktika vivo de la miloj kaj miloj da esperantistoj; ne tiun Esperanton el antaŭ 30 kaj 40 jaroj, sed tiun, kiu estas uzata ĝuste nun.

Orlová, decembro 1937.

Henriko Seppik

## ESPERANTO SIGNIFAS POR MI . . .

Lajos Tárkony

Esperanto min altiris en printempo en mia 16-jara aĝo. Min kaptis la dolĉa sono de la lingvo kaj ĝia facila kompreniĝo, granda avantaĝo antaŭ la lingvoj latina kaj greka, kiujn mi lernis en la gimnazio. Kaj jam tiam mi eksentis la idealan bonon, kiun ĝi alportos al la homaro. Mi ĵetis min al la lego de Esperanto-gazetoj, al korespondado kun membroj de la "verda familio". La poŝto alportis al mi leterojn kaj poŝtkartojn el kvin mondopartoj; mi interŝanĝis librojn, revuojn, vojaĝis al Esperanto-kongresoj.

Poste venis miaj literaturaj provoj, recenzoj, studoj, tradukoj (versaj kaj prozaj); miaj unuaj versoj, mia studlibro pri karaj, grandaj talentoj de la Esperanto-literaturo; kaj venis la neforgeseblaj redakciaj kunvenoj de la kara kamarada rondo: Literatura Mondo.

Sub sufoka milita atmosfero, en mia kreskanta izolo, la dolĉeco de la Esperantaj rimoj, la nesuperebla esprima klareco de la lingvo, ĝia pura, simbola donaco por la homaro estis mia sola konsolo.

Mi kredas: Esperanto helpas la homaron al nova, beata vivo sur ĉi tiu terglobo. El la multaj obstakloj, kiuj ankoraŭ malhelpas ĉi tiun novan vivon, Esperanto venkos unu el la plej gravaj: la lingvan nekomprenon.

Ho, Esperanto, kiam vi venkos glore, memore vi gardos ankoraŭ la vibron de ĝojoj kaj tristoj de l' fruaj kantistoj:

Kaj inter ili eble  
kuntremos feble  
la postmorta vibro tarda  
da mia koro arda.

Budapeŝto, la 29-an de majo 1976. (Laŭ Juna Amiko)

LAJOS TÁRKONY (1902-78) estas elstara poeto, tradukisto kaj kritikisto. Milda voĉo, profunda doloro pro maljustaĵoj interhomaj, forma perfekteco kaj senpera lirika esprimo karakterizas lin.

La libro "DE PAĜO AL PAĜO" pritraktas jenajn verkistojn: Julio Baghy, Karlo Bodó', Hilda Dresen, Stellan Rnholm, Jean Forge, Nikolao Hohlov, Kolomano Kalocsay, Kenelm Robinson, Raymond Schwartz, K. R. C. Sturmer, Francisko Szilágyi.

Prunteprenu ĝin el nia kluba biblioteko!

## DISTRA PAĜO

Anekdotoj pri famaj homoj (ES 1978/5)

### RAYMOHD QUENEAU

Konata franca verkisto Raymond Queneau iam diris, ke li ĉiun romanon komencas legi de la mezo.

"Kaj dank' al tiu ĉi metodo la libro katenas mian intereson duoble: mi pensas kaj pri tio, kiel ĝi finiĝos, kaj kiel ĝi komenciĝis."

### FRANK LLOYD WRIGHT

La fama usona arkitekto Frank Lloyd Wright estis foje antaŭ la tribunalo kiel atedtanto.

"Via nomo?" oni demandis lin.

"Frank Lloyd Wright."

"Via profesio?"

"La plej granda arkitekto en la mondo."

Unu el liaj amikoj demandis lin poste, kial li respondis tiel.

"Kaj kion mi estu dirinta?" indigniĝis Wright. "Mi ja antaŭe devis ĵuri, ke mi parolos nur la veron...!"

### ALBERT SCHWEITZER

Kiam la unuaj bicikloj venis en Afrikon, la indiĝenoj rigardis la biciklistojn kun granda malestimo. Tio koncernis ankaŭ la kuracistojn de la konata malsanulejo de D-ro Schweitzer en Lambaréné. La doktoro mem aŭdis, kiel unu indiĝeno, vidante preterveturi iun el liaj asistantoj sur biciklo, diris kun rideto:

"Tiuj blankuloj estas tiel pigraj, ke ili ec tiam sidas, kiam ili rapidas."

### MIKEL-ANĜELO

Iu kritikisto, estante ĉe Mikel-Anĝelo, iris de bildo al bildo rigardante ilin atente. Antaŭ unu bildo li diris:

"Pardonu, majstro, sed mi ankoraŭ neniam vidis anĝelon kun sandaloj sur la piedoj."

"Kaj ĉu anĝelon sen sandaloj vi jam vidis?"

---

Bulteno de Esperantista Klubo en Brno

Aperas ekde la jaro 1952 /Vychází od roku 1952/

Eldonas /Vydává/: Klub esperantistů v Brně, p.přihr. 154, 657 54 Brno

Redaktas /Rediguje/: Josef Vondroušek, Zdenek Hršel, Jaroslav Lisý

Presas /Tiskne/: Městské kulturní středisko S.K.Neumanna v Brně

Ekspedas /Expeduje/: Adolf Veselý

Por la membroj senpage /Pro členy zdarma/

La finredakto de tiu ĉi numero /Uzávěrka tohoto čísla/: 26.8.1990

Snížené výplatné povoleno 7.3.1990 JMR spojů v Brně, č.j. P/3-2982/90